


15

1511

1

AMERIKA ESPERANTISTO



FEBRUARY, 1914 - 1915

700.007-B.Esp-
1914-1915



ENHAVO

	Paĝo
El la Redakcia Sanktejo.....	3
Sur nia Tablo.....	4
? ? ? ?.....	6
Important	7
Book Reviews	8
Esperanto en Persujo.....	9
Komunikajo de "Lingvo Internacia".....	10
Maljunaj Vojaĝantoj	10
Socialismo kaj Esperanto.....	11
Rapsodio pri la Esperantismo.....	13
Nella	14
Propagandisto en Manhattan.....	15
Mi Rekompencos (Ĉap. 1).....	19
Rakonto pri Epaminondas.....	22
Stelisto	24
Pri la Kreado de Dioj en Svedujo.....	25
Nova Banko	26
Official Communications	27
World Gleanings	30
Kroniko Nordamerika	31

PRESA ESPERANTISA SOCIETO

33, RUE LACÉPÈDE, PARIS

La plej malnova el ĉiuj esperantaj gazetoj (fondita en 1895).

Plej enhavoriĉa! Plej klasika!
Plej malnova!

Lingvo Internacia


Centra organo de la Esperantistoj. Ĉefredaktoro Th. Cart. Aperas regule ĉiumonate: 48 pĝ. da plej bona teksto! Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Specimena numero por unu respondkuponon.

Juna Esperantisto

Sola esperanta gazeto por la gejunularo! Fondita en 1903.

Monata Gazeto Belektristika por Junuloj, Instruistoj kaj Esper.-Lernantoj. Redaktoro P. de Lengyel. Jara abono 3 fr. (1 Sm. 200). Specimena num. por unu respondkuponon.

Lingvo Internacia kaj Juna Esperantisto kune j. ab. 7 fr. (2 Sm. 800).



Botoj, Ŝuoj, Sandaloj, Pantofloj, Kaŭĉukaj Ŝuoj, Ŝtrumpoj. Ĉiuj eksklusive laŭ la tipo 'Naturformo.'

HOLDEN FRATOJ,

**3, Harewood Place,
Oxford St., London, W.**

Katalogoj Senpage.

If you have the great desire to write--the usual sign of inborn literary talent--careful study of the twice-monthly numbers of THE EDITOR will enable you to produce and sell manuscripts. Each number contains inspiring and informative articles by editors and writers on important phases of literary craftsmanship. Vital questions are answered in the "Questions and Answers" Department. Each number contains, in "The Literary Market" Department, news of opportunities to sell all kinds of literary material.

Twice-monthly

\$1.50 a year \$.10 a copy

THE EDITOR, Box E, Ridgewood, N. J.

LA MOVADO

L'ESPERANTISTE FRANCAIS

Oficiala Organo
de la Societo Franca por la propa-
gando de Esperanto

Publikigas informojn pri la or-
ganizado de la Xa Universala Kon-
greso de Esperanto en Parizo, 1914,
la Pariza vivado kaj aliaj plej in-
teresaj aferoj.

Ĉiuj gesamideanoj, precipe la es-
tontaj gekongresanoj, devas do legi
ĝin.

Jara abono Francujo; Fr. 2, 50

Alilando: Fr. 3, 25—Sm. 1,300

41 Blvd St. Marcel, Paris, Francujo

Sendo de la lasta numero kon-
traŭ unu internacia respondkuponon.

LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRATA REVUO
(fondita en la jaro 1909).

Ĉiu jarabonanto ricevos *senpage* la
libron:

"ORIENTA ALMANAKO"

*el la lingvoj japana, hina, araba, hinda,
sanskrita, persa, armena, kartvela k. t.
p. k. t. p.*

"La Ondo" aperas akurate la 1-an datan,
novstile. Ĉiu n-ro havas 16—24 paĝ.
Formato 17x26. Bela kovrilo.
(Poŝtk. ilustr.)

Sendu abonpagon (\$1.10) alla *Ameri-
can Esperantist Co., West Newton, Mass.*

TO NON-EPERANTISTS:

Ask your enthusiastic Esperan-
tist friends for a small English
grammar of the language. Every
real Esperantist carries a number
of this handy little propagandilo.

25 Keys for only 25 cents. 100 for
only One Dollar.

The American Esperantist Co., Inc.
West Newton, Mass.

DEZIRAS KORESPONDI

[Unufoja anonco kostas 20c. (40 Sd.) por ĉiu
linio. Kvarfoja anonco kostas 50c. (1 Sm.)
por ĉiu linio. Linio enhavas proksimume 40
literojn, punktojn aŭ spacojn.]

Multaj instruistoj kaj gestudentoj vo-
las korespondi kun ge-samideanoj
en Usono kaj fremdaj landoj.
Adresu: S-ro P. M. Schuyler, Estro
de Lernejoj, Pickford, Mich., Uso-
no. 6

S-ro Stanj Dakov, Ogenstrelen Skald,
Sofia, Bulgaria. 2

S-ro Arkadio Borisov, Blagoveŝĉensk
a, Amur, Russia. 2

S-ro Karel Sašek, Rlegrovy sady No.
2, Vinohrady, Praha, Bohemia,
Austria. 2

POLA ESPERANTISTO

Monata gazeto, aperadas okan jaron,
ĉiam pliinteresigante sian programon.

En 1913-a jaro "P. E.," krom 12 ilus-
trataj, zorge redaktataj numeroj en
klasika, pure fundamenta Esperanto,
donos al siaj abonantoj senpagan:

"LITERATURAN ALDONON"

(200 paĝa volumo)

Sendu abonpagon (\$1.40) al la
American Esperantist Company, West
Newton, Mass.

Foreign Magazines

Twelve copies, our selection, back num-
bers, for only sixty cents

The American Esperantist Co., Inc.
West Newton, Mass.

You Ought to take SCIENCA GAZETO

*A monthly magazine entirely in Espe-
ranto, devoted to Science and Industry.*

Contains semi-technical articles on many
interesting subjects. Subscribe for your
own pleasure—and show each copy to
some scientific friend.

Send Subscription (\$1.50) through
The American Esperantist Co., Inc.
West Newton, Mass.

(Sample copy, 20 cents)

BOOKS! MAGAZINES!

We take this occasion to announce that all Magazine Subscriptions or Orders for Books of any nature published in U. S. may be sent to us, and will command the most prompt and careful attention

Magazine Subscriptions received at Publisher's Prices

CLUB RATES QUOTED upon application

Help make this addition to our business a success. Send in your renewals or new subscriptions to your favorite periodicals TODAY

Our new magazine catalogue sent free on request

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.
West Newton, Mass.

BUY BOOKS WITH A

COUPON TICKET

You get \$5.50 in coupons for \$5.00, or \$11.00 for \$10.00. The saving in money is good, but the saving of time is better. Quick and convenient—if you want three books, worth \$1.65, you just cut off \$1.65 in coupons, and mail them with your order. If, as sometimes happens, the 35-cent book is out of print—back comes a 35-cent string of coupons and the transaction is closed. No waiting at the post office window for a money order!

Convenient? That's where we get even—it's so convenient that it makes ordering books a positive pleasure.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.
WEST NEWTON, MASS.

Amerika Esperantisto

American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)

WEST NEWTON, MASS.

ONE DOLLAR A YEAR Eksterlande \$1.25 (Sm. 2.50) SINGLE COPY TEN CENTS

Mallongaj verkoj, tradukajoj kaj novaĵoj ĉiam prefere akceptitaj. Oni ne resendas neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone.

Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaŝine.

Vol 15

FEBRUARY, 1914

No. 1



EL LA REDAKCIA SANKTEJO



Post la festoj de la Kristnaska tempo kaj la multaj aferoj rilate al la komenco de nova jaro, ni nun povas doni iomete da tempo kaj zorgo al pensoj pri la venonta Chicago-Kongreso. Vere, samideanoj, tiu kongreso devos esti notinda okazo en la historio de la esperanta movado en Usono. Ĝi montros ĝis la plej alta grado al scivolemuloj kaj mokemuloj ke la usona Esperantistaro nek mortis nek dormas, sed estas vivanta laboranta unuiĝo de samcelanoj senĉese batalantaj por la afero. Ĉi tiun, la kongreso certe montros, nur se ĉiu Esperantisto kiu povas iri tien, iros, kaj donos sian ĉeeston al la kongreso kaj al la aliaj anoj tie, praktikan signifon de sia subteno. Dum kelkaj jaroj ni ne havis nacian Esperantan kongreson kiu estis inda je movado tia. Kvankam la 1912a Bostona kunveno estas bona kaj neforgesebla memoro al ĉiu kiu partoprenis, tamen, ni devas konfesi ke la loko estas malproksima kaj la distanco tro granda por allogi samideanojn el la centraj kaj okcidentaj ŝtatoj. Sed nun, kiam la estroj de EANA elektis Chicago'n kiel la oportunan urbon, ni ne povas diri ke, ni ne

havas centran lokon. Por foresto nenian pretekston ni havas—escepte certe la altan flugadon de vivelspezoj. Forgesu tian, tamen, kaj formu viajn planojn por ĝuema Esperanto-Semajno venontan someron. Kune kun la gravaj aferoj rilate al la Asocio kaj al metodoj de propagando, raportoj, k.t.p., ni havos la plej ĝojan kaj plej interesan libertempon kiu iam ravigis nin en niaj plej dolĉaj revoj. Ĉiu alvenu. Komencu nun kaj ŝparu la prezon de la fervoja bileto. Ni pripensu pri la “vivrimedoj” kiam ni alvenos tien, aŭ poste.

Ĉiu usonano kiu deziras havi aliĝilon kaj informaĵon pri la Deka Universala Kongreso de Esperanto (Paris, 2-10 aŭgusto, 1914) sendu 2c poŝtmarkon al nia oficejo. Por helpi al la indaj penadoj de la kongresaj estroj ni esperas ke multaj sendos la kotizaĵon eĉ se oni ne intencas ĉeesti. La A. E. Redakcio petas ke usonaj esperantistoj bonvole sciigu ĝin pri intencoj foriri parizon por la kongreso.

SUR NIA TABLO

Antaŭ kvin monatoj, mi esprimis la esperon ke, en la daŭro de kelkaj jaroj, Amerika Esperantisto trovos lokon inter la serioze recenzitaj gazetoj. Estas kontentige ke jam aperis kelkaj favoraj recenzoj de nia ido, en la plej gravaj el niaj naciaj organoj; unue, pro la artikoloj de nia Eŭropa korespondanto, kiu pro sia sindono al Esperanto ĉesas esti nacio kaj fariĝas internacio; due, pro eltrovita merito de nia pli humila nacia redaktoro. Rilate la duan, ni deziras danki “Espero Katolika” pro ĝiaj komplimentoj de nia recenzo, kaj certigi al la redakcio ke ni ĉiam respektos ĉian religion, kaj ĝian sinceran esprimon kaj propagandon, kvankam nia propra kredaro iom malsimilas. Tamen, ni ne povas kredi ke pro Esperantista ĝentileco estas necese ke ni aprobu, aŭ eĉ ne rimarku la tutan mankon de religio, ĉu de grupo, ĉu de gazeto. De la tempo kiam historio estas nur tradicio, la homo havas ian religion kaj adoras aŭ Dion, aŭ diaron. Kiu estas tute prava, ni ne provu konstati.

Ankaŭ fierigas nin la komplimentoj de nia Brita kuzo, kiu profetas al ni “baldaŭ” lokon inter la eminentuloj de la gazetaro. Kvankam mi persone estas la enkorpiĝo de modesteco, la mencio de mia humila fako kuraĝigis min ke mi petegu de la ĉefredaktoro ke li tuj duobligu mian salajron (du ĝazetoj ĉiumonate, kaj sufiĉe da blanka papero por enhavi mian “kopion”).

Sed, estas ĉiam "muŝo en la ŝmiraĵo" (mi esperas ke tiu diro estas sufiĉe internacia por ke ĝi ne ofendu la akutajn sentojn de la nomota gazeto). Jus kiam ni estas krevonta pro memestimo venas la januara numero de "Ondo" kaj ĵetas nin de la altaĵoj pro sia mokema kritikado de nia uzo de la vorto "seĝon," rilate al la enkondukado de Esperanta fako ĉe la "University of Pittsburg," sugestante ke la vorto "katedro" eble ne estas konata de ni. Nu, unue, la paragrafo estas kopio de sendita novaĵo; due, nia naŭdek miliona loĝantaro estas tiel civilizita ke ĝi donas al sia profesorado "seĝon" anstataŭ "podion," aŭ eĉ "katedron." Estas vere ke nia juĝistaro ankoraŭ kontentigas sin per "benko" sed al ĉiu alia aŭtoritata persono ni donas la honoron de "seĝo." Laŭ mia greka vortaro "kathedro" signifas "chair" t. e. "sidejo" "sidloko" aŭ io, sur kio kutime oni sidas. Kiel mi diris, ĉi tie, en Ameriko, kiam ni unuope sidas ni ĉiam uzas "seĝon." Eble kiam ni tute esperantiĝos, ni revenos al antikvaj kutimoj kaj anstataŭos "katedron."

Vere, Ondo estis iom kritikema, je sia januara numero, ĉar "La Vero" ankaŭ suferas kun "Amerika Esperantisto," siaflanke ĉar ĝi franclingve mencias "Ondo." Eble nia eminenta gazeta amiko ankaŭ kritikos nin, ĉar parto de nia gazeto estas anglalingva. Pro multe da legado de interŝanĝaj gazetoj mi bone konas la ĝenadon al la recenzisto, pro nacilingva enhavo, kaj nia tuta redakcio bedaŭras la neceson ke iu parto de nia gazeto estu en la angla lingvo. Nuntempe, tamen, A. E. estas la sola grava gazeto en nia lando, kaj pro ĝentileco kaj utilo al tiuj el niaj abonantoj, kiuj estas aŭ preskaŭ neesperantistoj, aŭ almenaŭ, nespertaj esperantistoj, estas tute necese ke ni uzu, kelkfoje, nian propran lingvon. Estas espereble ke, post ne longe, ni povos dividi nian gazeton, eldonante unu tute esperantan literaturan gazeton, kaj por la propaganda kaj informa fako, tute apartan gazeton. Ju pli baldaŭ nia alilanda abonantaro pligrandiĝas, des pli baldaŭ ni povos fariĝi tute esperanta.

Ĝi estas angla diro (eble ankaŭ internacia) "kiu loĝas en vitra domo, tiu ne ĵetu ŝtonojn." Ni citas tiun diron pro legado en la "Orienta Almanako," redaktita de la kritikema eminentulo, de la jena frazo, trovebla sur paĝo 19; "Mi neniam parolis por vundi sian kunhomon." Eble nova uzado de la refleksiva pronomo, kiu ne ankoraŭ enpenetris en la sovaĝecon de Ameriko.

Lastatempe, mi ruze enŝtelis en "E. L. A." kaj de nun, ĉi tiu fako estos "aprobata" de almenaŭ unu membro de tiu grava asocio.

? ? ? ?

We are requested to suggest translations for the following:—
The natural advantages of a city: La naturaj profitoj (oportunajoj) de urbo—**The opportunities for money-making:** La okazoj (la oportunaj okazoj) por gajni monon—**Iceboat; to iceboat:** Glacijaĥto, velglitveturilo, glitiranta boato; veliri sur glacio etc.—**He thinks little of a thirty mile hike:** 30-mejla promeno estas facilega por li (li tute facile marŝas 30 mejlojn)—**Within 6 miles of here:** Ne pli malproksime ol 6 mejlojn de ĉi tie (en sesmejla radio de ĉi tie)—**Towards but not as far as St. Paul:** Al sed ne ĝis St. Paul—**But for him I should be dead:** Escepte pro li mi estus mortinta—**Pollen:** Poleno, florpolvo (if you mean our Colonel, no translation is necessary, everybody knows him)—**Electric plant:** Elektrofarejo, elektroproduktejo—**To be in a hurry:** Ĝesti rapidema (ne havi multe da tempo)—**To keep the stores busy:** Okupadi la butikojn—**An agricultural district:** Agrikultura (terkultura) regiono—**It is known as the golden state:** Oni nomas ĝin la ora ŝtato—**Preferable to:** Preferinda al (je, ol, etc.)—**To stand by a statement:** Subteni diraĵon (ankoraŭ same opinii)—**To stand by him in trouble:** Defendi (helpi) lin (resti lia amiko) en malfeliĉaĵo—**To steer west by north:** Piloti (direkti ŝipon) norden de la rekta oriento—**Come by all means:** Nepre venu—**A tailor by trade:** Tajloro je metio—**To see fit to do it:** Deziri (voli, esti volanta) ĝin fari; aprobi ĝian faradon—**It won't open:** Ĝi tute ne malfermiĝis—**A slice of bread or toast:** Pantranĉaĵo (detranĉaĵo da pano), aŭ panrostaĵo—**To spin (metal):** Kavigi (metalon turniĝantan en tornilo)—**Ball bearing pedal:** Pilkpivotinga pedalo (pedalo kun pilketoj en la pivotingo)—**Typewriter carriage:** Skribmaŝina deportilo—**Passive voice:** Pasiva formo—**Lockout (a labor trouble):** Dungorifuzo, rifuzo de dungado (por devigi ke dungitoj cedu al la dunginto)—**One cent and three mills:** unu cendo kaj tri dekonoj (da cendo)—**Named after my sister:** Samnoma kiel (samnomulo de) mia fratino; laŭnomita laŭ mia fratino—**Parsee:** Fajradoranto, zoroastrano—**With interest at five per cent:** Kun rentumo po kvin procentoj—**Slush:** Degelaĵo.

Remarks: In regard to technical expressions,—nautical, mechanical, economic, etc., like those above,—any person except the expert on those lines (such as we may be justified in assuming the inquirer to be) must go to the English dictionary and find out just what the expressions mean. Then this definition can be put into Esperanto as concisely as possible. No other method is possible until the experts in the various lines of technical work have gotten together and compiled full dictionaries for themselves. Occasionally some technical expressions may be noted in the present dictionaries, but their existence may not be relied upon as a general rule.

In regard to colloquial or distinctly national expressions, such as one should not expect to find in the international language anyway, the method is, to think out what the words or phrases **mean** (or look in the English dictionary if it contains them), and translate these "good English" equivalents or definitions into Esperanto.

In regard to derivative ideas, which are seldom given independently in the Esperanto dictionaries, select the root from which such word could logically be derived, and look it up: Frequently the very derivative desired will be given as an example (Cf. "slush" in Millidge under **degeli**). If the root evidently is not the one from which the word can be derived, try some other root, and work it out logically, making your own compound, if a compound seems possible.

(See the list of dictionaries given on pages 2 and 3 of the catalog-supplement to the October number of Amerika Esperantisto.)

IMPORTANT

The Business Department of the American Esperantist Co. wishes to make an explanation to those of its patrons who have subscribed through us to LA REVUO and the SCIENCA GAZETO. As these subscribers know, they have always received their copies of these magazines direct from the Company's offices, due to the fact that by special arrangement with the publishers we received a large shipment of each every month to fill subscriptions on this side of the water. With the September number the shipments suddenly ceased. Thinking that probably the magazines had temporarily suspended publication owing to the death of Carlo Bourlet, and the consequent ensuing confusion, we waited,—but—when our own exchange copies were received we immediately wrote the publishers asking the whereabouts of our bundle orders. No reply, and to no less than a dozen other letters sent them, requesting, praying for, demanding either an explanation or the missing copies, we likewise have received no reply. Our Paris representative is now taking up the matter personally, and we hope at last to get some satisfaction. We only wish to say that while the "complaints" which we are receiving daily are certainly entirely justifiable, it is only taking **your** time to write them, and more of ours than we can possibly spare to answer them. We assure you that the day the copies of these magazines are received at our office that same day yours will be sent you. For reasons, good, bad or otherwise, we are not "spitefully" withholding the magazines from our customers, but will be more grateful than they can possibly imagine, to have this trouble straightened out to the satisfaction of every one concerned. We would be glad to print herewith our opinion of the publishers of these magazines, who do not give us even the ordinary courtesy of a reply to our communications, but unfortunately our supply of asbestos paper has been exhausted in writing to them.



BOOK REVIEWS

LA KAMENA ANGULO, 50 pages, 22 cents.

An indifferent translation of "The Chimney Corner," a soul harrowing melodrama of the vintage of '61. British in location, British in action, and British in manner of speech, the translator makes it international by transmuting L.d.s. into Spesmiloj; honest pounds into "hektogramoj." The father in the play makes the poor defenceless grandfather of 93 inquire about "jarmutaj fumajitaj haringoj,"—(yes, Yarmouth bloaters, how did you guess?) assures the round faced English Bobby "per honestaj Esperantaj vortoj, k. t. p." later on soothes his disturbed mind by a few strains from "En Maksveltona valo loĝadas angelin'" (recognize it?). Later on he tends to business in his shop and sells "spesdekojn da alumetoj." Still later he is so overcome by his emotions that he forgets that he is an Esperantist and begs his son to thrash him, that it may go down to history as an example of "brita redono." The hero, who according to all circumstantial evidence "ĉekis falson," is finally cleared from all suspicion, rescues the heroine from a hated marriage with his designing and mercenary rival and all ends with red fire and soft music.

LA VORTO. Ĉapitro XXII from LA VOJO DE L' VIVO. 17 pages, 10 cents.

Sixteen pages of aphorisms, selected by the author from the writings of centuries of the world's thinkers, relating to speech. "La vorto estas esprimo de l' penso kaj povas servi al kuniĝo kaj disiĝo inter homoj; pro tio estas necese uzi ĝin singardeme."

KVIN NOVELOJ, 258 pages (cloth), 70 cents.

The fact that this book is No. 5 in the series of Internacia Mond-literaturo speaks for its excellence of presswork and binding, and assures that its contents are worth reading. It is a collection of novellettes from five German authors of the early part of the nineteenth century. The Esperanto is excellent and it is evident that the trans-

lator has preserved in a measure the styles of the original authors; for there is a noticeable difference in the Esperanto style of each. The character of the tales is also diverse, beginning with a tragedy and ending with an emotionally dramatic story which might well have been written by Boccaccio. This is a book for the mature as well as the experienced Esperantist and to such it is well worth several readings as a study of literature and flexibility of Esperanto style to accommodate itself to the original from which translation was made. The best of the stories (and they are all good) is "Malriĉa Muzikisto." It is simply written, unusual in character and full of pathos.

SUPERFORTA AMBICIO, 52 pages, 15 cents.

A story of a Russian who took up Esperanto for "what there is in it," his subsequent disappointment and desertion. While this is hardly a good propaganda work it is a faithful picture of a type to be found in Usono as well as Russia. The hero failed to receive coveted office in his society, tried Ido until he found that there were no Idists to be found outside a few promoters, became disgusted with the whole thing and withdrew into oblivion. Being a Russian instead of an American it did not occur to him to seek the coveted prominence by founding a rival society.

ESPERANTO EN PERSUJO

La Centra Oficejo de la Persa-Amerika Asocio por Edukado en Vaŝingtono, D. C., Usono, ricevis la novaĵon, ke en Persujo oni estas organizinta diversajn studklasojn de Esperanto. Ĉe la lernejo "Tarbiat" en Teheran klaso de la Internacia Lingvo jam funkciadas. En la urboj Tabriz kaj Urmial en Persujo, oni multege interesiĝas kaj granda entuziasmo regas, kaj la Persa-Amerika Asocio por Edukado en Vaŝingtono estas provizanta la necesajn lernolibrojn. Ĉio tio estas bonega komencado, kaj oni esperas, ke multaj klasoj baldaŭ stariĝos en aliaj urboj persaj, ĉar la nuna Majstro de la Bahai'a Revelacio, Abdul Baha, ordonis al siaj tri milionoj da persaj kredantoj studi ĉi tiun lingvon. Kaj oni scias bone, ke en la oriento religiaj devoj estas ĉiam konsciencie plenumataj. Amerikaj Bahai'anoj ankaŭ studas la Internacian Lingvon.

KOMUNIKAĴO DE "LINGVO INTERNACIA"

Ŝajnas ke nin tute ne komprenis amiko Privat, en artikolo de "Amerika Esperantisto", Dec., 1913. Malkuraĝaj ni ne estas nek timemaj, sed ni scias, kien nin kondukus troa junula memkonfido, nesperteco kaj nesingardemo,—kion ni celas? Ĉu varbi al Esperanto la pacifistojn? Ĉu ĉiujn ajn homojn eĉ militemajn? Se nur la pacifistojn, kiun grandan utilon alportus Esperanto al ilia propagando? Se la aliajn ankaŭ, unua kondiĉo estas ne forigi ilin kunligante Esperanton kun pacifismo. Ĉu en tia diro estas ia malkuraĝo? Ia timemo? Ia malŝato aŭ admiro por la registaroj? Ni, do, vidu la mondon tian, kia ĝi estas, ne tian kian ni ĝin deziras aŭ volas! Ni estu idealistoj, jes, sed samtempe firmaj realistoj. Ni preparu pli belan morgaŭan tagon, laborante sur nia hodiaŭa kampo, ne sur post morgaŭa; tio alportus al ni nur disreviĝon. Niaj kongresoj estu larĝe malfermitaj al ĉiuj, jes al ĉiuj, kiaj ajn estas iliaj idealoj, kaj ĉiuj trovu sin tie hejme, ĉar inter Esperantistoj! Kaj nun ni relegu la belan elokventan paĝon per kiu la "Onklo" finas sian lastan leteron. Modestaj laboristoj en granda verko, tiun paĝon, ni meditu, ni komprenu!

Th. Cart,

Ĉefredaktoro de "Lingvo Internacia."

MALJUNAJ VOJAGANTOJ

Jurnalo en Harrismith (S. Afriko) raportas le jenon (12-9-'13):

Tre respektinda nigrulo, kiu estas aĝa ne malpli ol 119 jaroj kune kun edzino (98 jara) kaj filo (80 jara) foriris el Harrismith antaŭ kelkaj tagoj per la vagonaro. La pli maljuna viro ĵus ekposedis farmbienon en Transvaal'o, kaj tien iras por komenci novan vivon, kun tiom da entuziasmo kiom vidiĝus je viro de 21 jaroj. La virinon oni devis porti al la vagono, sed la viro iom rekte marŝis. Ili altiris multajn rigardadojn, kaj la fervojaj oficistoj faris ĉion eblan por ilia komforta veturado. Estas malfacile kompreni, en tiaj tempoj de rapida ŝanĝo kiaj la nunaj, ke per la foriro de tiuj tri personoj, la distrikto perdas viron, kiu naskiĝis en 1794, kaj tial vivis en tri diversaj jarcentoj. Ke ili restu feliĉaj dum siaj lastaj tagoj deziras la enloĝantoj de Harrismith kaj ĉirkaŭaĵoj.

El la "Natal Mercury,"

Tradukis Leonard Wood,

Durban, So. Africa.

SOCIALISMO KAJ ESPERANTO

ESPERANTO estas propraĵo nek de iu ajn partio, nek de iu ajn religio. Ĝi estas, kiel ni ne ĉesos rediri, nur lingvo; kaj samrange kiel ĉiuj aliaj lingvoj, ĝi povas kaj devas servi al ĉiuj sendiference.

Tial oni ne devas miri ke laŭ ekzemplo de Katolikoj, kiuj rajte vidis en ĝi rimedon por renversi la barilon kiun starigis inter ili kaj iliaj fremdaj samideanoj la diverseco de la lingvoj, la Socialistoj intencas siavice uzi ĝin por ekrilati kun siaj alilandaj kamaradoj. Ni eltrovas hodiaŭ pruvon pri tio ĉe du ĵurnaloj: unua Eŭropa kaj la alia Azia.

La unua estas nacia. Estas "LA ESPERANTISTA LABORISTO" kiu en ĝia tiu-ĉi monata numero publikigas, je faktitolo "Decido" artikolon, el kiu ni eltiras la sekvantajn liniojn: "La laborista internacia agado estas ofte malhelpata en sia antaŭeniĝo de la diverseco de la lingvoj... en la internaciaj kongresoj, la delegitoj parolantaj la germanan, anglan aŭ francan lingvon, povas, solaj, plenumi proksimume ilian komision. Sed ili nur profite atente aŭskultas la diskutojn se ili komprenas samtempe tiujn tri lingvojn, kion preskaŭ neniam kapablas laboristo... La uzo de helpa lingvo preciza, kiun oni lernas facile kaj rapide, eĉ sen multe da klereco, estus bono por la propagando de la socialista idealo... konsekvence la subskribintoj petas de la federacia konsilantaro ke ĝi metu en la tagordon de la proksima federacia kongreso la jenan demandon: ESPERANTO KAJ SOCIALISMO.

La alia ĵurnalo estas "LA ĤINA SOCIALISTO," gazeto lukse eldonata, scivolinde paĝordigita, skribata parte en esperanta lingvo, parte en ĥina lingvo, kies nia kuncivitano S-ro Grives ricevis tiujn tagojn, kiel delegito de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, du numerojn je malsama koloro presitajn. En unu el tiuj du ekzempleroj, ni legas—en la esperanta parto, kompreneble, ĉar ni ne bezonas diri ke ni ne estas kompetenta pri la ĥina lingvo—la jenon: GRAVA AVIZO.—Nia revuo ĉiunumere publikigas ĉiujn artikolojn pri socialismo, esperantismo, feminismo kaj laborismo en esperanta kaj ĥina lingvoj. Tial ni danke akceptos manuskriptojn en Esperanto de eksterlandaj samideanoj kaj bildojn, fotografaĵojn k.t.p. koncerne tiujn kvar celojn.

Jen komparo kiu nepre impresigos niajn legantojn. Kaj se ni aldonas al la Katolikoj kaj al la Socialistoj la Mutualistojn kies la

lastan semajnon ni sciigis la decidon alprenitan en la Kongreso de GENT kaj la Liberpensulojn kiuj ankaŭ intencas baldaŭ kongresi per Esperanto, neniuj rifuzos konfesi kun ni ke, en ĉiuj rangoj de la Societo, oni serioze ekkomprenas la servojn, kiujn estas difinita por fari Esperanto. Kaj niaj legantoj volonte konfesos ke la tago, kiun ni postulas per niaj deziroj en la artikolo kiun ni publikigis tiun-ĉi monaton en "LA MOVADO", ne malfruos brili dum kiu "ĉiu disponos du lingvojn: sian nacian lingvon por ĉiuj rilatoj kun siaj samnacioj, kaj Esperanton por kapabli, en ĉiuj okazoj kaj sen malfacilaĵoj, interparoli, voĉe tiel bone kiel skribe, kun alilanduloj, kiu ajn estu la nacia lingvo de ĉiu el ili."

Ni ne ŝanceliĝu do helpi, ĉiuj, la alvenon de tiu tago. Kaj ni bone atentu ke tiel agante, ni ne nur laboros por plibonigi nian komunan staton, sed ni kunhelpos samtempe la amikigon de la popoloj, kiu se ĝi ne povas sola forigi por ĉiam la militojn, tamen utilos laŭ granda mezuro ilin pli kaj pli maloftigi.

L. DeMarcy

Komitatano de la Societo por la Franca Propagando
de Esperanto.

HELP !!

This letter was received at the office of A.E. a few days ago:

"Dear Sir:—

As I am troubled with a trouble which I would like very much to have cured, I would like if you could explain the meaning of esperanto. I think probably it means the same as I have. If it is the same, I will write to you at once. I would gladly give you a trial. Hoping you will write me at once and give me the full meaning of esperanto, and oblige,

_____"

Full information was sent the sufferer by return mail, and we trust he is entirely "cured" by this time.

El la "Latest" sporta ĵurnalo:

Fraŭlo (ĉe dancbalo)—Oni diras ke oni lernas Esperanto'n en ĉiuj altgradaj lernejoj en Ameriko, Britujo, Francujo, k.t.p.

Fraŭlino—Ĉu ĝi similas la "Tango" (danco).

RAPSODIO PRI LA ESPERANTISMO

De H. I. Keyes

I.—“En la mondon venis nova sento.”

Demetu la ĉapelon, klinu vin;
 Heroo dormas sub ĉi tiu ŝtono
 Al kiu bone decas laŭra krono;
 Li mortis pro patrujo. Laŭdu lin.

La epitafo kroĉis kiel hoko,
 Kaj altirante al si la atenton,
 Konigis unu tomban monumenton
 Al ĉiu vizitanto ĉe la loko.

Tenante junajn filojn je la manoj
 Alvenas patroj, kiuj atentigas
 La idojn pri l' heroo, kaj sciigas
 Ke lin imiti devas la infanoj.

Amase la homaro preterpasas,
 Kaj ĉiu homo vidas, legas, benas;
 Por ĉiu ŝajnas, ke la strofo tenas
 Inspiron, kaj impreson daŭran lasas.

La jena penso kaptas, forte tenas
 Penseman knabon—unu el milmilo:
 “La paco, ne milito, estas ilo
 Al mondaferoj kiu plej konvenas.

“Al gloro povas manki la profito;
 Ja honorinde estus li mortinta
 Se li militon estus subpreminta,
 Anstataŭ bataladi en milito!”

II.—“Ne al glavo sangon soifanta.”

“Pro propra lando—sia genta rondo”
 Fervore en la knaba koro sonis,
 “Ĉi tiu homo sian vivon donis—
 Pli noble, vivi por la tuta mondo.

“Pli bone estus serĉi samajn trajtojn
 En ĉiuj landoj, inter ĉiuj gentoj,
 Por nutri ilin ĝis amikaj sentoj—
 Ne militistoj—gardos homajn rajtojn.”

Ĉe tio, la okulojn li malfermis—
 Ekvidis antaŭ si li gloran celon:
 Disfendi fine la malmolan ŝelon,
 Sub kiu longe homkonsento ĝermis.

III.—“Sub la sankta signo de l' espero.”

Ĉu tia celo estas ja fantomo?
 Li tamen prenis sur sin la laboron,
 Dum la espero metis en la koron
 La venkajn fortojn de heroo homo.

Malhelpoj lin ne venkis, sed inspiris—
 “Ne batu maltrankvile, mia kor’,
 Ĉu mi ne venkos en decida hor’?”
 Kuraĝe klopodante li eldiris.

Li venkis. Estas en la simpla diro
 La sumo de vivlonga sindonado,
 Promeso pri tutmonda konsentado,
 Plenumo de tuthoma korsopiro.

IV.—“La bela sonĝo
 Por eterna ben' efektiviĝos.”

Vin, Zamenhof! dankeme ĉiam tenos
 En sia koro ĉiu posteulo;
 Vin, Majstro! bonfaranta geniulo!
 Popoloj kunligitaj ĉiam benos.

Post jaroj, kiam monda paco regos,—
 Glorantoj antaŭ unu monumento,
 Kun koroj plenaj de altiga sento,
 Surskribon jenan sur la ŝtono legos:

Demetu la ĉapelon, klinu vin;
 Heroo dormas sub ĉi tiu ŝtono
 Al kiu vere decas glora krono;
 Li venkis por la paco. Benu lin.

NELLA
aŭ
La Vojo Nekonata

Originala Novelo de Edmond Privat

Ĉapitro VI

Tremante ŝi paŝis en la salomon kaj apogis sur la kameno sian kapon en siaj manoj. Ŝi ne havis bandaĝon. Li ŝin vidis tian, kia ŝi nun estas ĝis morto. Kion ne sukcesis la leteroj, tion faris unusekunde ŝia apéro. Nun estis ŝi sola, sola, sola por ĉiam en la mondo. Revenis en ŝia memoro la stranga vidaĵo pri l' terura kluzo. Jam sonis en ŝiaj oreloj la tondra fluego de l' ondoj. Ekploris ŝi longe, mallaŭte, el tuta koro. Facile estas pensi, decidi, sed travivi

Dume Paŭlo rapidis en la strato, marŝante ĉiam rekte antaŭ si sen konscia celo, aŭdante nenion, vidante nenion ĉirkaŭ si, havante en la okuloj nur tiun neforgeseblan aperon en la spegulo; la fantoma restaĵo de lia Nella.

Kio lin kvazaŭ puŝis for de l' domo? Kial li forkuris kiel senkuraĝa malnoblulo? Li mem ne ĝuste sciis. Malgraŭ ĉiuj liaj supozoj la subita apero momente perdigis al li la saĝon. Li sentis unue teruran mirfrapon, poste senfinan kompaton al la malfeliĉega junulino kaj jen subite, antaŭ ol li povis ekmovi aŭ paroli, lin plenigis terura honto, ke li perfortis la malgajan sekreton de korsuferanta nobla virino, ke li ŝin kvazaŭ trompis, kaj li kiel sago forkuris, sed, ho ve, tro malfrue, ĉar ankaŭ lin ekvidis Nella, kaj tiel plej akre li vundis ŝin sendefendan.

Li ja ne havis rajton veni tien kaj ŝin vidi kontraŭ ŝia volo. Tamen nur ŝian feliĉon li deziris; eĉ noble kaj amplene li intencis agi. Kial do lin forkurigis stranga forto? Ĉu li nun revenos al ŝi kaj proponos la edziĝon? Kial do enfluas nun lian memoron nur ŝiaj rifuzoj, nur ŝiaj petoj al disiĝo? Kial jam ne ŝajnas al li malnobla tia forlaso? Kial eĉ lin hontigis nur lia trudita vizito kaj ne lia malkuraĝa tro malfrua forkuro? Plenigis nun lian koron senlima admiro al grandanimeco de Nella. Kiel sinofereme, saĝe ŝi skribis. Kial li ne volis ŝin aŭskulti? Kial li do provis agi superhome estante nur malforta, senkuraĝa lastminute? Kiel naŭzis li sin mem. Nun ĉio estis finita spite lia granda amo—tamen tro malgranda.

Facile estas pensi, decidi, sed travivi

Longan, humilan, pardonpetan leteron Paŭlo skribis al Nella la saman vesperon; sed nur tiun ĉi respondon li ricevis: "Tutkore mi pardonus, se vi estus kulpa, sed mi scias ke nur amo vin venigis kontraŭ mia volo. Ankaŭ mi rajtas peti vian pardonon. Ne skribu plu. Tio nin ambaŭ tro suferigus. Ni iru niajn apartajn vojojn kun kuraĝo. Mi sendas al vi lastan kison.

Via Nella."

Post kelkaj tagoj Nella ricevis eltranĉaĵon el arkitektura revuo; "Al la grupo de niaj junaj kolegoj, kiuj forveturos sabaton sur la 'Prince Alberto' por partopreni la konstruadon de l' anoncitaj modelaj urboj en Nov-Zelando, ni devas aldoni la nomon de nia kunlaboranto S-ro Paŭlo Kermas, kiu lastmomente decidis akcepti proponon de la entreprena societo S.P.N.D., kies projektojn ni detale ekzamenis en nia lasta Numero."

(Daŭrigota)

PROPAGANDISTO EN MANHATTAN

POVAS esti ke aliaj samideanoj vidiĝis, en la *New York American* de la 12a de lasta oktobro, artikolon de Frederick Townsend Martin asertantan ke: "La senokupa klaso sin konsideras la zorganto de la artoj, la pli alta lernado, la pli alta kulturo, la pli alta vivo."

Legante tion mi kvazaŭ vidis grandan lumon. Lingvo internacia apartenas al kelke da tiuj aferoj; klare do por starigi firme la lingvon en ĉi tiu lando de egalrajtoj por ĉiuj, esceptante azianojn kaj virinojn, necesas simple propagandi inter tiuj individuoj kiuj gardas la pli altan lernadon, niaj gepatronoj de kulturo, la senokupa klaso. Tre bone.

Posttagmeze en la sama tago kun mia kuzino Eda mi min trovis ĉe Geraldin, nia amikino de infanaj jaroj, kiu edziniĝis kun duobla milionulo kaj konsekvence, laŭ la citaĵo, devas esti bona specimeno de patronino de la pli altaj aferoj. Dum paŭzo en la konversacio Eda, kiu estis promesinta helpi min, kvazaŭ ne estas en la kapo io pli grava por diri, ekbabilis: "Kial vi ne lernas la lingvon neŭtralan, Geraldin? Ĝi certe multe utilis al vi kiam vi vojaĝas tra Eŭropo."

"Ĉu vi aludas Esperanton?" respondis tiu oscedante. "En tio estas nenio nova, mi jam aŭdis pri ĝi. Unue en Marseille, en librejo tie, kiam mi alparolis france al iu el la mizeraj komizoj. Vi scias ke frue en miaj knabinaj jaroj mi komencis studi la francan. Nu, tiu ŝafkapo la komizo respondis al miaj zorge elektitaj vortoj per tio ke

li ne komprenas Esperanton. Vi ridetas? Ho, multe da amerikanoj konstatas ke ofte en Francujo troviĝas personoj kiuj estas tre nesciaj rilate sian gepatran lingvon.”

“Eble pro tio ke Esperanto jam estas tiom vaste uzata,” mi kuraĝis intermeti. “La francoj estas ĝiaj plej varmaj amikoj. Ili scias kio estas utila.”

“Se ĝi estas tiom utila,” diris Ĝeraldin, “kial la registaroj ne interkonsente ĝin uzas? Kio malhelpas ilin en tio? Sed por kio ni maltrankviliĝu pro lingvoj? La mondo devas esti tiel kiel ni trovas ĝin. Mi mem estas vera optimisto kaj opinias ke ĉio estas tia kia ĝi devas esti.”

Unu fojon, kiam ni estis tre junaj kompreneble, mi allogis la naivan Ĝeraldin ĝis rando de lageto da kota akvo, kaj krime enpuŝis ŝin. Tion dum tuta la vivo mi estis bedaŭrinta—ĝis tiu momento. Vi komprenas.

“Certe, Ĝeraldin, vi pensas tiele,” Eda respondis; “vi kiu vivas ĉirkaŭata de ĉio kion la koro virina povas deziri; vi kiu estas juna, bela, leĝe disigita de la edzo kaj sen la ŝarĝo infana.” Dum la irado tien Eda estis dirinta ke ŝi multe bedaŭras seninfanajn virinojn.

“Efektive ĉu ĉio estas tiel kiel ĝi devas esti?” mi enmetis. “Rekonsideru. Jen vi loĝas en apartamento kies luado kostas al vi almenaŭ dek mil spesmilojn jare; vi pasigas la vintron ĉe St. Augustine, la someron je la montetoj Berkshire; ofte intertempe vi vizitas iun el viaj amikinoj, aŭ vojaĝas—konsideru ĉion ĉi tion kaj tiam rigardu tra fenestro al la urba parko sube. Tie sidas viroj kiuj pro tio ke al ili mankas dormloko devas dormeti en ĉi tiu parko, super kiu sin trovas la luksa litĉambro via sen okupanto dum pli ol duono de la jaro. Ĉu tio estas justa?”

“Vi ne volas ke mi pensu vin socialisto?” demandis Ĝeraldin, ridetante kvazaŭ la socialismo estas plej ridinda afero. “Kiom vi eraras. Neniu dormas en la parko, la policianoj ne permesas tion.”

“Vi rimarkis do kiel la urba registaro kondukas koncerne la tieajn malfeliĉulojn! Vi jam honoris ilin per ekrigardo!”

“Ofte dum horoj mi ilin rigardis,” respondis Ĝeraldin serioze; “kaj ĉiam venas al mi en la kapon ke strange estas ke tiaj kreitaĵoj nenion farantaj havas la privilegion monopoli la tutan belan parkon, dum ni, la okupantoj de apudaj loĝejoj, ni kiuj apartenas al sfero supra pro tiaj homaĉoj ne povas eĉ trapasi nian parkon.”

Mi ne atentigis ŝin ke ĉio estas tiel kiel ĝi devas esti. Mi estis tro humiligita. Sia aludo al sfero supra estis iginta min, honeste mi parolas, ŝanceliĝi sur mia seĝo. Ĝis tiu momento pri la societa grado

de Geraldin mi sciis nur ke ŝia familio, en la jaroj de nia infaneco, estis unu el la plej malnovaj ĉe Fervoja strato, Whitesboro, N. Y. "Supra sfero" estus pensiginta ŝian patron pri la luno aŭ marso. Jen fine kiel la pli alta vivo montriĝas ĉe la neokupatoj.

"Ni diskutu ion diskutindan," sugestiis Geraldin. "Ni estu de nun praktikaj."

"Ja jes," konsentis Eda kaj mi, kun la penso ke nun venos mencioj kleraj rilate arton, la pli altan lernadon, k.t.p.

"Ni la scenejon preparolu," ŝi daŭrigis.

"Ĉu tia estas praktika temo?" demandis Eda. "La scenejo prezentas nur travestion de la vivo." Eda estas progresemulino. Sed ĉar virinaj rajtoj tute okupas ŝin, ŝi ne trovas tempon multe interesiĝi en nia lingvo, tamen je okazoj ŝi ĝin propagandas.

"Pli bone konsideri la vivon travestio de la scenejo," respondis Geraldin. "La vivo estas nur vulgara farso de ĉiuj belecoj dramaj."

"Almenaŭ oni devas konsenti ke estas rimarkinda malsameco inter ili," mi diris. "Ekzemple, oni sin sentas alte regalita per vido de la fama, nigra militisto Otelo amindumanta la blankulinon Desdemona; sed ĉu edifiga tiu klasika tragedio kiam ludata en la vivo mem? Kiam en la nuna jardeko fama, nigra batalisto, aŭ pli ĝuste boksisto, amis blankulinon, kio okazis? Pro malestimo de ŝiaj samrasanoj la blankulino sin mortigis, kaj la nigra heroo, Jack Johnson, sin trovis tuj en malliberejo."

"Ne rememorigu pri abomenaĵo," admonis la ambaŭ junulinoj. Ostkapulo mi estas.

"Vi vidis la dramon Otelo, Geraldin?" Eda demandis.

"Certe. Tre fervora amanto estis Otelo." En la bluaj okuloj de la malnova konatino mi kaptis misteran lumon. "Kiom li amis sian Desdemona'n," ŝi aldonis duonkuŝante sopire en sia brakseĝo.

"Ĉu li provizis ŝin per dek mil spesmila apartamento?" de mi.

"Ne opiniu," diris Geraldin kun subita energio kaj tute al malfeliĉa mi, "ke pro amo mia edzo donas al mi ion. La leĝo devigas lin fari tion kion li faras. Pro tio ke li subtenas min mia edzo meritas nenion miaflanke."

Mi silentis, diplomatie subpremante miajn verajn sentojn. Mi havis la malican penson ke se tiu mizerulo, la edzo de Geraldin, enirus tiun ĉambron—kie li efektive ne havis pli da enira rajto ol la malfeliĉuloj en la parko—kaj per litkuseno Otelo-simile sufokigus Geraldinon, li devus ricevi, almenaŭ por kelke da sekundoj dum la vivo restus al ŝi, pli da edzina respekto ol iam antaŭe.

“Kompreneble li ne amas,” diris Eĉa. “Ne laŭmoda nun estas la amo inter geedzoj.” Estis ironio kaŝita tie, sed Geraldin nenion kontraŭdiris.

“Kaj ĉio estas tiel kiel ĝi devas esti,” pensis mi. Mi faris mian adiaŭon kun la decido malkaŝi iam ĉi tiun interesan bildeton de unu el niaj, laŭ Frederick Townsend Martin, zorgantoj de la pli alta lernado, kulturo kaj vivo; sed mi faras tion ĉi tie nur pro la sekvanta pli agrabla okazo, kun kiu ĝi estas pro kontrasto ligita.

Du semajnojn poste, marŝante unu tagmezon sur Sesa avenuo iom norde de Dudek-tria strato, mi ekvidis nian verdan stelon sur unu el la miloj da knabinoj kiuj preterpasas je tiu horo. Malgranda kaj nigrokula ŝi estis kaj havis eble 18 jarojn; butika komizino evidente. Ŝi eniris restoracion. Mi sekvis ŝin kaj sidiĝis ĉe tablo apud la ŝia.

“Vi parolas Esperanton?” mi demandis.

Ŝi sin vigle turnis, rigardadis min kaj notante mian stelon rideto lumigis ŝian vizaĝon. “Ĉu mi parolas Esperanton?” ŝi respondis angle; “ne, sinjoro, sed malgraŭ ke mi eĉ neniam antaŭe aŭdis vorton en ĝi, mi komprenas vian demandon. Mi estas iomete Esperantistino.”

Oni portis al ŝi sandviĉojn kaj kafon, kaj dum kelkaj minutoj ŝi ĝuis sian lunĉon sen atento al io ajn cetera. Mi ankaŭ ekmanĝis kun la konfido ke la knabino mem rekomencos la interparolon. Kiam ŝi finis ŝi longe rigardis min, kaj fine petis: “Kial vi estas Esperantisto?”

“Ĉar mi esperas iam viziti Eŭropon,” mi diris. “Kaj vi?”

Ŝi ridis gaje. “Mi ankaŭ esperas iam veturi en Eŭropo kaj pere de Esperanto,” ŝi diris. “Vi eble ne kredas, tamen tio estas la vero. Pro tio mi intencas bone lerni ĝin, kaj por ke mi ne forgesu la intencon mi la stelon portas.”

Mi ne povis ne rideti, tiom strange ŝajnis ĉi tiuj vortoj parolataj de tia kia ŝi. Verŝajne ŝi sentis ke mi daŭre dubus ŝin se ŝi ne klarigus plu. “Mi ĉiam havis deziron viziti Francujon,” ŝi daŭrigis. “Oni diras ke ĉiu estas pri io freneza, kaj ĉe mi la frenezeco tiel montriĝas, ĉar vere ne racie estas ke mi tenu la ideon. Mi opinias ke mi naskiĝis kun ĝi. Sendube ĝi venas de mia patrino, ĉar la patro kaj lia prapatro estis usonanoj, dum la patrino estis franca-kanadino. Ŝia familio estas malnova. Unu el ŝiaj prapraavoj venis Kanadon el Alsaco, ĉirkaŭ 1750, kiel soldato de Francujo. Estis tiam ia milito. Post ĝi li ekloĝis ĉe **Trois Rivières**. . . De tie mia patrino venis Usonon. Estis parenco, duon-kuzo Heroux, ĉe **Trois Rivières** kiu interesigis min pri la lingvo internacia. Mi mem neniam vidis Kanadon, nek volis ĝin vidi, sed Francujo—La nomo estas por mi la plej muzika el

nomoj. (Kvankam Alsaco estas nun sub germana regado, miaj pra-praavoj ĉiuj estis francaj certe.) La bildoj de franclandaj urboj, vilaĝoj kaj kamparo ĉiam mistere allogis. Mi ne povus esti feliĉa unu momenton se mi devus pensi ke neniam mi vidos Francujon." Ŝi levigis, kaj starante aldonis: "Du malhelpoj estas antaŭ mi sur la vojo—manko da mono kaj manko da kono de la lingvo franca. Mi laborenspezos la monon, kaj ĉar mi malesperas iam lerni la francan pro ĝiaj malfacilaĵoj kaj manko da tempo ĉe mi, mi devas lerni Esperanton, kiun mi estas certa mi povos bone akiri sufiĉe frue por la vojaĝo. En la tempo kiam mi havos la necesan monsumon, ĉiuj eŭropaj vojaĝantoj uzos tiun lingvon." Kun fina rideto ŝi kapsalutis kaj rapidis for, kiel persono kiu havas premantajn aferojn.

La koro estis malpeza kiam mi eliris el tiu restoracio, kaj mi kantetis pecon da malnova kanto kiun mia patrino amis pri "la belaj alsacaj montoj." La simpla deklaro de tiu knabino estis mondriginta al mi kiom negrave estas ĉu la sfero supra sin interesas en nia lingvo aŭ ne. Per la kuraĝaj revantoj inter okupataj homoj Esperanto iras antaŭen.

Kiu ajn vi estas viaj revoj efektiviĝu, ridetanta filino de filino de Alsaco.

M. James.

"MI REKOMPENCOS"

—Rom. 12, xix.

Originala novelo de John L. Stanyan
(Speciale verkita por Amerika Esperantisto)

"Oni nomas min feliĉa—
Mi pro tio ridas,
Ĉar kaŝitan mian ploron
Ili ja ne vidas.

Malfeliĉa de naskiĝo
Restos mi ĝis la morto;
Kial naskis vi, patrino
Min por tia sorto?"
—Trad. A. Grabowski.

Ĉapitro I

De kiam li havis kvar jarojn Georgo Kenriĝ estas orfo. Li ne povas rememori pri la patro, sed li bone rememoras la dolĉan vizaĝon de la patrino, kiu, antaŭ ol ŝi mortis, petegis al sia fratino ke ŝi prizorgu la knabeton. Tiu onklino estis edziniĝinta tre riĉan viron kiu estis multe pli aĝa ol ŝi. Kiam la patrino de Georgo estis mortinta, sinjorino Dekster persvadis sian edzon ke li permesu al ŝi venigi la etulon en ilian propran hejmon. Ili mem havis du gefilojn; filinon unu jaro pli aĝan kaj filon du jaroj pli aĝan ol Georgo.

Jaroj forpasis, dum kiu sinjoro Dekster kaj lia filo komprenigis al Georgo, ke li ja estas orfo, kaj nur pro ilia bonkoreco li permesigis restadi kun ili; ke, sen tiu bonkoreco li devus vivadi en iu orfejo aŭ malriĉulejo. Eta Mario kaj la patrino estis egale amemaj al la soleca knabo, kiu ricevis de sia onklino la saman pripensemon, kiun ŝi vidigis al siaj propraj gefiloj.

Mario kaj Georgo estis preskaŭ ĉiam kunludantoj, kaj, de la tempo kiam ili estis geetuloj, ili daŭre ŝajnigas ke ili estas geamantoj. Tiu infana amikeco pli kaj pli fariĝis pasia amo. Forpasis dek jaroj de post kiam Georgo eniĝis la familirondon. Li estis pli grandkorpa ol estas kutime je dekkvinjaruloj, kaj Mario, kiu tiutempe estis deksejara, estis kvazaŭ bildo de beleco.

Iun belegan Septembran vesperon, ili sidiĝis sur roko en apuda kampeto malantaŭ la domo. Kunmetinte la manojn ili subvoĉe parolis dolĉajn vortojn unu al la alia.

“Karulo mia,” diris Georgo, “mi ja scias, ke ni ankoraŭ estas junaj, kaj ke viaj gepatroj estas tre riĉaj—ke mi estas, neniu; sed, mi sentas en mia koro, ke eble iam mi havos sufiĉon, kaj povos feliĉigi vin en nia propra hejmo. Vi ja scias, ke ni reciproke estas geamantoj de kiam ni estis etaj infanoj, kaj ĉiam ŝajnis, ke ni edziĝos kiam ni fariĝos pliaĝaj. Nuntempe, Mario mia, mi havas alian specon de amo por vi, kaj volas sigeli tiun ĉi novan ekziston per kiso. Ĉu vi min kisos? Nun ni estas realaj geamantoj—ĉu ne vere? Iam vi fariĝos mia edzino, ĉu ne, amatino mia?”

Aminde levinte sian vizaĝon, ŝi mallaŭte respondis, “Jes, mi tion promesas.”

Iliaj lipoj kunmetiĝis, kaj subite ili aŭdis brueton kaj ekkrion. Ĉirkaŭen rigardinte, ili vidis Frankon, la fraton de Mario, staranta ĝuste antaŭ ili.

“Mario,” Franko per nekutima voĉtono diris, “mi opinias, ke estus bone se vi rapide hejmenirus; la patrino estas demandinta pri la kaŭzo de via foresto.”

Mario kun iom da timo tuj forrapidis al la domo.

Franko sin turnis al Georgo. Li estis kolera.

“Kaj tiu ĉi estas la maniero per kio vi dankas al tiuj, kiuj bonkoreme malpermesis ke vi eniru iun malriĉulejon, kaj kiuj nutris kaj vestigis vin—vi almozulo! Tio ĉi estas tio, kion vi faradas. Ne kontentiĝinte pri manĝado kaj dormado sub la sama tegmento kun viaj superuloj, vi volas malbonigi mian fratinton, kaj—kiel la hundo tia vi estas—mordi la manojn, kiuj manĝigas vin. Al mia patro mi konigos ĉi tion; sendube li agos laŭ via malindeco. Ne plu vi estas inda je io

de li; ne plu vi estas mia kuzo. Vi estas mizera fripono. Eble vi diros, ke vi amas mian fratinnon kiel frato. Kiel frato! Mensogisto vi estas; mensogisto, mi ripetas.”

“Ĉesigu!” ekkriis Georgo. “Vi ja havas la rajton diri al via patrino, kion vi volas, sed mi vin avertas, ne plu uzu tiajn vortojn. Mi ne scias pri pli malbona fripono ol la frato, kiu eldiras tiajn insultplenajn esprimojn koncerne sian propran fratinnon. Se denove vi nomos min ‘mensogisto’ mi devigos vin engluti la vorton. Mi amas Marion, kaj ŝi estas promesinta al mi, ke ŝi edziniĝos je mi, kaj mi neniam eĉ elspiretis nebonan vorton al ŝi.”

“Ree, mi vin nomas mensogisto,” kriegis Franko, dum li levigis sian bastonon por ekbati Georgon.

Georgo saltis kontraŭ li, kaj bategis lin sur la vizaĝon tiel forte, ke Franko kiel peco de ligno falis teren, verŝajne mortigite. Dum kelkaj sekundoj Georgo klinumis super la falinto; poste li rapidis al apuda rivereto, baldaŭ revenante kun saturita naztuko, per kiu li viŝis la frunton de la senkonscia kuzo. Post malmultaj minutoj Franko estis ankoraŭ unufojon sur la piedoj, kaj sur lia vizaĝo vidiĝis nigra makulo.

“Vi estu malbenata, Georgo Kenriĝ! Tre kare vi pagos pro ĉi tio!” li siblis.

“Manbatalo estas io nekutima kaj certe nova je mi,” malrapide respondis Georgo, “sed mi tutkore kontentigos vin, ie kaj iam, laŭ via deziro.”

Duonhoro forpasis, kaj estis bruado en la domo. Franko estis pridirinta al la patrino pri tio, kio okazis inter li kaj Georgo. Sinjoro Dekster furioziĝis pro la rakonto pri la amindumo inter Mario kaj Georgo. Li silentis ĝis kiam oni finis la vespermanĝon. Tiam li insulte parolis al Georgo.

“Nur dum ĉi tiu nokto mi permesos al vi resti sub mia tegmento,” li diris, “sed, morgaŭ matenfrue—je la sunleviĝo—vi por eterne forlasu mian domon. Ŝajnas al mi, ke troviĝus en vi sufiĉe da hontemo pro tio, ke vi estas mizera dependulo, tiel ke vi ne penus malpurigi kaj malĉastigi mian filinon, Mario. Mi malbenas vin—for, for de mia sojlo!”

“Edzo! Ĉesigu!” ekkriis sinjorino Dekster. “Vi ja forgesas, ke viaj geinfanoj apudestas. Ne estas dece en vi, tiel koleriĝi. Eble, Georgo ne estas kulpa pri io.”

“Honto je vi!” respondis tuj la edzo, “penante senkulpigi tiun knabaĉon. Ŝajnas, ke vi opinias ke estas tute dece, ke li amindumas Marion unu momenton, kaj pugnobatas Frankon la sekvantan momenton.”

(Daŭrigota)

LA RAKONTO PRI EPAMINONDAS KAJ LIA ONKLINO

(Sudusona Sensencaĵa Rakonto)
de Sara Cone Bryant

La sekvanta rakonto estas tiel verkita, ke ĝi bone taŭgas por deklamado ĉe esperantistaj kunvenoj. Pro tio sin trovas tie ĉi kaj tie inter krampoj bezonataj klarigoj.

Epaminondas kutimis iri al sia onklino preskaŭ ĉiutage, kaj ŝi preskaŭ ĉiam donis al li ion por alporti domen al la patrino.

Unu tagon ŝi donis al li grandan pecon da kuko; bela, flava, bongusta, orkolora kuko.

Epaminondas prenis ĝin en sia pugno kaj iris domen, forte premante ĝin. Kiam li alvenis domen restis en la mano nur iom da pecetoj. Lia patrino diris,—

“Kion vi havas tie, Epaminondas?”

“Kukon, patrino,” respondis Epaminondas.

“Kukon!” diris la patrino. “Epaminondas, vi ne havas la prudenton kun kiu vi estis naskita! Tio ne estas la maniero porti kukon. La maniero porti kukon estas envolvi ĝin bone en folioj kaj meti ĝin en vian ĉapelon, kaj veni domen. Ĉu vi aŭdas min, Epaminondas?”

“Jes, patrino,” respondis Epaminondas.

La sekvantan tagon Epaminondas iris al sia onklino, kaj ŝi donis al li funton da butero por lia patrino; bona, freŝa, dolĉa butero.

Epaminondas envolvis ĝin en folioj kaj metis ĝin en sian ĉapelon, kaj metis la ĉapelon sur la kapon, kaj revenis hejmen. Estis tre varma tago. Baldaŭ la butero ekfluidiĝis. Ĝi fluidiĝis kaj fluidiĝis, kaj dum ĝi fluidiĝis, ĝi fluis laŭ la frunto de Epaminondas; tiam ĝi fluis laŭ la vizaĝo, kaj en la orelojn, kaj laŭ la nuko. Kiam li alvenis domen, ĉiom de la butero estis sur li. Lia patrino rigardis lin, kaj tiam diris,—

“Ĉielo! Epaminondas, kion vi havas en la ĉapelo?”

“Buteron, patrino,” respondis Epaminondas; “Onklino donis ĝin al mi.”

“Buteron!” diris la patrino. “Epaminondas, vi ne havas la prudenton kun kiu vi estis naskita! Ĉu vi ne scias ke tio ne estas la maniero porti buteron? La maniero porti buteron estas envolvi ĝin en folioj kaj porti ĝin al la rivereto, kaj malvarmigi ĝin en la akvo, kaj malvarmigi ĝin en la akvo, kaj malvarmigi ĝin en la akvo, kaj tiam preni ĝin en viaj manoj, zorge, kaj alporti ĝin domen.”

“Jes, patrino,” diris Epaminondas.

Baldaŭ, alian tagon, Epaminondas ree iris viziti sian onklinon, kaj tiun ĉi fojon ŝi donis al li novan hundidon por alporti domen.

Epaminondas envolvis ĝin en folioj kaj portis ĝin al la rivereto; kaj tie li malvarmigis ĝin en la akvo, kaj malvarmigis ĝin en la akvo, kaj malvarmigis ĝin en la akvo; kaj tiam prenis ĝin en siaj manoj kaj revenis hejmen. Kiam li alvenis domen la hundido estis mortinta. La patrino rigardis ĝin kaj diris,—

“Dio mia! Epaminondas, kion vi havas tie?”

“Hundidon, patrino,” respondis Epaminondas.

“Hundidon!” diris la patrino. “Je ĉiuj sanktuloj, Epaminondas, vi ne havas la prudenton kun kiu vi estis naskita! Tio ne estas la maniero porti hundidon! La maniero porti hundidon estas preni longan pecon da ŝnuro kaj ligi unu finaĵon ĉirkaŭ la kolon de la hundido kaj meti la hundidon sur la teron, kaj teni en la mano la alian finaĵon de la ŝnuro kaj reveni hejmen.”

“Tre bone, patrino,” diris Epaminondas.

La sekvantan tagon, Epaminondas iris viziti sian onklinon, kaj kiam li estis preta foriri ŝi donis al li panbulon por la patrino; bruna, freŝa, krusta panbulo.

Tial Epaminondas ligis ŝnuron ĉirkaŭ la panbulon, prenis la finaĵon kaj revenis domen tiamaniere (Imitu tiradon de objekto laŭ la tero). Kiam li atingis la hejmon la patrino rigardis la aĵon je la finaĵo de la ŝnuro, kaj diris,—

“Je la mortinta hundido! Epaminondas, kion vi havas je la finaĵo de la ŝnuro?”

“Panon, patrino,” respondis Epaminondas; “Onklino donis ĝin al mi.”

“Panon!!!” diris la patrino. “Ho Epaminondas, Epaminondas, vi ne havas la prudenton kun kiu vi estis naskita; vi neniam havis la prudenton kun kiu vi estis naskita; vi neniam havos la prudenton kun kiu vi estis naskita! Nun mi ne plu diros al vi kiamaniere vi devas alporti aĵojn hejmen. Kaj ankaŭ ne iru viziti la onklinon. Mi mem iros. Sed mi diros al vi nur unu vorton, Epaminondas! Vi vidas ĉi tiujn ses pasteĉojn, kiujn mi bakis? Vi vidas ke mi metis ilin sur la ŝtuparo por malvarmiĝi? Nu, vi aŭdas min, Epaminondas, gardu vin kiel vi piedpremas tiujn pasteĉojn!”

“Jes, panjo,” respondis Epaminondas.

Tiam la patrino de Epaminondas surmetis sian ĉapelon kaj sian ŝalon kaj prenis korbbon en la mano kaj iris viziti Onklinon. La ses pasteĉoj sidis en vico sur la pordŝtupo kaj malvarmiĝis.

Kaj tiam,—kaj tiam,—Epaminondas estis tre singarda kiel li piedpremis tiujn pasteĉojn!

Li piedpremis (imitu)—unu—pasteĉon—post—la—alia.

(Kun permeso de Houghton, Mifflin Co., Boston)

Tradukis Lehman Wendell.

ŜTELISTO

MALGAJA arbaro. Ekfloris neĝe senfoliaj arboj: karpenoj kaj fagoj kaj kverkoj fortegaj, iam verdaj, kaj nun vestitaj en glacio kliniginte siajn kapojn al tero, silentas ĉiuj.... Malgaja arbaro, malserena, ĉar malvarma kiso de la vintro, kaj malluma nokto kuŝas sur ĝi.

Kaj Temofij staris apud karpeno. En truita ŝafpelto, en botoj de sia edzino, en senhara kaj detruita ĉapo, staris kaj varmigis siajn manojn.

Malvarme, ho! ho! ho! malvarme al mi....Kaj ankoraŭ vento, kaj frosto malvarmega....

Li staris kaj varmigis siajn manojn. Poste elprenis hakilon kaj kraĉis en manojn. Hej! hej!....Ektondris hakado, unua, post ĝi dua, tria....

La neĝo surŝutis sur lin kaj kovris lian kapon per blankaj kristaloj, kaj li hakis unu, du...

Kaj poste aliris arbaristo. Li parolis nenion, ne kriis kaj ne malbenis, nur levis pafiltenilon kaj ekbatis per ĝi kapon de vilaĝano.

Ho, sinjoro! sinjoro....Ĉe mi....tie....hejme infanoj ŝvelas de malsateco kaj malvarmeco.

La larmoj premiĝis tre al okuloj kaj premigis lian gorĝon, kaj liaj vortoj intermitis en brusto. Li ekploris, kiel infano....Reiris hejmen sen karpeno kaj sen hakilo. Vento ventumis tra kampo. Al li estis ĉiam pli malvarme en botoj de edzino. Li kuris sur la malmola neĝo por varmiĝi. Pensoj flugadis unua pli tedema ol alia dua.

Iru hejmen kun kio ci volas, aŭ iru kaj pendiĝu! Ho! infanoj miaj, infanoj, per kio mi nutros vin, kaj per kio mi vin varmigis?....

Kaj tiom da neeldirebla ĉagreno estis en tiuj vilaĝanaj vortoj, ke eĉ vento ekventumis pli malĝoje, kaj ŝajnis, ke ĝi ankaŭ pliploras vilaĝanan doloron.

Infanoj miaj, infanoj, per kio mi nutros vin kaj per kio mi vin varmigis?

Kaj per maniko de la truita ŝafpelto viŝis li larmojn ĉagrenajn, maldolĉajn, sangajn.

Li iris kaj antaŭ li nigra kaj malvarma nokto.

El Ukraina lingvo tradukis

Ivan Tkaĉuk.

PRI LA KREADO DE LA UNUAJ DIOJ EN SVEDUJO

Ĉiuj popoloj serĉis per lerno pri la dioj klarigi la devenon de la mondoj, la destinon de la homoj en la vivo kaj post la morto. La kredo kaj la penso kiujn la Svedoj havis estas priskribitaj en du malnovaj libroj nomitaj la Eddoj.

La Eddoj pridiras ke en la komenco de la tempo ekzistis nek tero, nek maro nek ĉielo, sed granda abismo nomita Ginnungagap. Sur unu flanko, en Niflhem, estis nur malvarmeco kaj frostoj, sur la alia, en Muspelhem, kie Surt regas, lumo kaj fajro. Kiam la vaporoj el Niflhem renkontis la lumradiojn el Muspelhem, ili komencis vivi, kaj el tio fariĝis tre granda giganto, nomita Ymer. Tiu giganto estis kolera, kaj ankaŭ ĉiuj kiuj devenis de li, kaj ili nomiĝis rimturs'oj. Sed la tri dioj Oden, Vile kaj Ve mortigis Ymer, en kies sango ĉiuj rimturs'oj droniĝis krom Bergelmer, kiu kun sia edzino savis sin per boato, kaj per ili pliiĝis la rimturs'oj.

La dioj kondukis la korpon de Ymer al Ginnungagap kaj kreis el tio la teron. El la sango fariĝis maroj kaj lagoj, montoj el la ostoj, arbaroj el la haro, herbo el la barbo, ŝtonoj el la dentoj. La kranion oni starigis super la tero kaj faris el tio la ĉielon. Sub ĉiu angulo oni metis pigmeon, Oriento, Okcidento, Nordo kaj Sudo.

Post tio la dioj prenis fajrerojn el Muspelhem kaj metis ilin sur la ĉielon kiel stelojn. Post tio ili kreis la sunon kaj la lunon, nokton kaj tagon. Meze de la tero oni starigis grandan fortikaĵon el la brovoj de Ymer. Tiu fortikaĵo nomiĝis Midgard; kaj tie loĝis la dioj, sed la gigantoj devis loĝi ekstere kaj ĉirkaŭ la marbordoj. Unufoje la dioj trovis ĉe la marbordo du arbojn preskaŭ senvivajn. Ili kreis el tiuj la unuajn homojn, Ask kaj Embla, kaj oni permesis al ili loĝi ĉe la dioj en Midgard.

El la Sveda lingvo tradukis

R. Hilding.

NOVA BANKO

MIRINDAN rakonton diras tri ĉasantuloj el Johannesburg'o, kiuj ĵus estas revenintaj de ĉasado apud la rivero Komati en Swaziland (Orienta Transvaal'o). Ili mortigis krokodilon sur la riverbordo, ĝin eltranĉante, ili trovis interne 25 orpecojn (kiuj valoras 10 spesmilojn) krom ok cervajn kalkanojn, iom da haroj (eble el la sama cervo), kelkajn ŝtonojn k.t.p.

Okazis ke la ĉasantuloj vagadis laŭ la riverbordoj, kiam ili rimarkis, kuŝantan sur ŝtonego, krokodilon. Unu el la tri pafis, kaj suprensaltanta en la aeron, ĝi teren falis senviva. Ili rimarkis ke la kuglo frakasis la spinon. La kunĉasantaj nigruloj eltranĉis la kadavron, kaj iom ekscitiĝis je la stranga eltrovo de moneroj (kiuj ankoraŭ briletis) en la ventro. Laŭ la desegnaĵoj sur la moneroj, kiuj plejparte portis kapon de Reĝina Victoria (de Anglujo) kaj senescepte daton pli fruan ol 1912, oni supozas ke la antaŭa posedanto eble estis nigrulo, revenante hejmen post amasigado de riĉeco ĉe la orminejoj; kaj tiu, transirante la riveron, estis formanĝata de la krokodilo, kiu estis iom aĝa. Tre eble (kiu scios?) estis kompatinda Anglo, transirante sur ĉevalo nokte, kaj la krokodilo lin fortiris de la selo. Pro la aĝo de la besto kaj dato de la moneroj oni supozas ke tio okazis antaŭ 10 jaroj.

La orpecoj estis iom eluzataj pro la longa kaŝo, kaj la randoj iom nedefinitaj pro la frotado je la ŝtonoj. Revenantaj al Johannesburg'o, ili sciiĝis ĉe la bankoj ke tiuj moneroj (pro pezperdo) nun nur valoras 8 anstataŭ 10 spesmilojn—sed kiel valoraj laŭ memoraĵoj kaj kuriozaĵoj. Kelkaj personoj esprimas deziron aĉeti por privataj muzeoj, sed la eltrovintoj ne disdonos.

Pri strangaj eltrovoj, mi povas citi la ŝarkon, en kies ventro fiŝkaptistoj ofte trovas malbonajn kaj strangajn aĵojn. Oni diras en la tagĵurnaloj, ke ŝarko, kaptita apud Durban'o antaŭ ne longe, enhavis interne viran piedon; mirinde diri, oni ricevis sciigon post kelkaj tagoj, ke maristo, de ŝipo iranta norden, falis maren kaj droniĝis antaŭ ol la boato lin atingis. Plue, je alia kaptaĵo, oni trovis virinan piedon, kovratan de blua silka ŝtrumpo. Kiu ne imagos al si mem pri la multaj dancoj kiujn faris la posedinto kun tiu piedo. Nun tamen, ŝi eble estas ĉe la marprofundo.

Eble ne multaj scias ke apud la Natal'aj marbordoj, sin trovas multaj ŝarkoj; pro tio marbanado estas danĝera. Dum la lasta jaro,

tamen, la ŝarkoj ne multnombre vidiĝas proksime al la marbordoj; ili povas sategi je la balenoj kiuj estas moropafitaj apude pro la oleo kaj aliaj produktaĵoj. Preskaŭ ĉiubaleno tirata el la akvo sur la kajo estas difektata de ŝarkmordoj. Ankaŭ oni ĵetas maren grandan kvanton de viandajo balena, kiu post eltiro de oleo, valoras nenio.

OFFICIAL COMMUNICATIONS

STUDENTS' ESPERANTO LEAGUE

The Students' Esperanto League has started the New Year off with a rush. The first Year Books of the League came from the press just in time for a New Year's gift to members, a circulating library of Esperanto books for the use of members has been started with one of the Executive Committee in charge, and the Bureaus of Correspondence and Instruction established in March, 1913, are being put into active operation in charge of the other two Executive Committee members. Meanwhile the cooperation of the officials of the Esperanto Association of North America is being sought in an advertising campaign designed to further the establishment of more local groups.

The Year Book is a well-printed brochure of sixteen pages giving the officers of the League, its organization, aims, and methods, a concise history and record of its work since its foundation in May, 1912, and finally an interesting and practical article on "Postcard Collecting for S.E.L. Members." It is designed especially for use in propaganda. Copies may be obtained from the Secretary of the League, Harold W. Kline, 100 North Second Street, Darby, Pa. for ten cents each.

The circulating library has been placed in charge of Frank Manning, 56 Atlantic Avenue, Portland, Maine. Several books have already been contributed by members. The books may be borrowed by any member on receipt of a request in Esperanto addressed to the Librarian and including the cost of postage both ways. A list of the books on hand will be furnished by Librarian on receipt of 2c stamp.

Miss Isabelle McCaffrey, West Newton, Mass., is in charge of the Correspondence Bureau and on request will advertise for and furnish the addresses of foreign correspondents to any member.

Thurston Wood, 2143 N Street, N. W., Washington, D. C., is in charge of the Instruction Bureau and will first undertake the unfin-

ished task of grading all members of the League according to their proficiency in the language as begun early last year. A letter will be dispatched to each member of the League in which they will be asked as to what grade they would prefer being tested for. The cooperation of the Educational Director of the E.A.N.A. has been requested in the work of this department.

Finally, an advertising campaign in certain boys' and girls' magazines such as "The American Boy," "St. Nicholas," "Popular Mechanics," etc. is planned with the object in view of greatly increasing the number of individual members and "rondoj" during the year. The aid of the Secretary and Propaganda Director of the Esperanto Association will also be asked in this campaign.

It is the specific aim of the Students' Esperanto League this year both to gain in membership and to increase its service to its members.

E. A. N. A.

Team Work

A certain farmer made the remark that his Tom and Jerry were "the best mated pair of horses in the State: Tom is willing to do all the work and Jerry is willing that he should." Once in a while it seems as though this classification applied to our members. There is a vast amount of work to be done and each must do his part and largely on his own responsibility, at the same time doing it in such a way that the total of individual efforts will result in progress. If there must be the "Jerrys" it will be much easier and more agreeable to the "Toms" if the "Jerrys" will not pull back on the collar nor kick.

Value Received

The average man when he puts half a dollar in the missionary box is content with the fact that he is doing something to help enlighten the heathen. He is not looking for a gilt-edged Bible, a year's subscription to the Missionary Herald and a ticket to the Church entertainment as premiums. The work of EANA is much the same as that of any mission,—spreading information among the unenlightened and giving them an opportunity to learn what Esperanto is. The question should not be "What am I getting out of the Association" but rather "What am I doing for it?"

We have recently had two ridiculous complaints: one from an individual, bewailing the fact that EANA has done nothing to hold the one-time six hundred members (?) in his State, now dwindled to a small fraction of that number. Has the timid servant hidden his talent in a napkin? The second complaint was from a small organization, which for the sake of its reputation we will leave nameless, to the effect that "our members feel that EANA is not doing enough for us and some of them wish us to withdraw and spend the money which we are paying to it for independent propaganda." The nameless organization enrolled a total of something like seventy-five members for 1913 and paid something under twenty dollars into the treasury of EANA!

Both the individual and the organization should realize that local results are largely dependent upon local effort and that with Esperantists in forty States to look after it is absolutely impossible for the Central Office to take up extensive local campaign. General propaganda is being conducted and inquiries received are forwarded to the nearest group or individual; from the time that such are received from the C. O. it should be the care of the recipients to see that they are properly followed up. We have hundreds of inquiries waiting to be "followed-up." Names will be sent on request of group secretaries or isolated EANA members.

U. E. K. and T. E. K. A.

Owing to tremendous increase of work on the affairs of EANA it is impossible that the General Secretary should continue active work in the above organizations. From this notice please address all communications and remittances for the medical associations to Dr. J. S. Gianfranceschi, 317 Portage Rd., Niagara Falls, New York.

EKLEZIA ESPERANTISTA LIGO

Esperantist members of the Anglican or Episcopal Churches who wish to become members of the above League may now make remittance direct to Mr. Roger Goodland, 535 Columbus Ave., Boston, Mass., who has been authorized to receive them. The fee for membership is 25c and any further voluntary contributions to the work of the League will be gratefully received and promptly forwarded.

NECROLOGY

We have just received the sad news of the sudden death of Mrs. H. W. Yemans, in Manila, P. I. The whole Esperantistaro extends sincere condolences to the bereaved husband, Dr. H. W. Yemans, who for many years has been an international figure in Esperanto propaganda work, and will be remembered as the presiding officer by those who attended the Sixth International Congress in Washington, D. C. The many friends whom both claimed in this country will undoubtedly be much surprised to hear of the sad event.

END OF OFFICIAL PART

WORLD GLEANINGS

SCOTLAND. The Chief of Police in Edinburg has become interested in Esperanto, owing to the efforts of fervent local enthusiasts, and has ordered that booklets about Esperanto be sent to 650 members, with the recommendation that the police should learn the language. This promises well for the success of the 1915 Congress in Hoot-Mon-ujo.

BRAZIL. The State of Rio has just passed a law approving Esperanto and permitting its instruction in the normal schools of the state, to be conducted by the Brazila Ligo Esperantista. The law which has been approved by the President, recommends that candidates for public offices should hold an "Atesto pri Lernado" from the Ligo.

HOLLAND. The Director-General of the Postal and Telegraphic Service has officially given permission that Esperantist postal employees may wear the Esperanto badge, a five-pointed green star, on the sleeve of their uniform.

GERMANY. In the city of Hamburg, more than eight groups meet weekly and arrange classes in the international language with excellent success. Many firms are using Esperanto in their business correspondence, and it is quite a usual occurrence to buy Esperanto magazines on the streets.

FRANCE. The first number of the Congress "Gazeto" has appeared, and certainly surpasses all expectations. The magazine is sent free to congress members, and it alone is well worth the congress fee.

KRONIKO NORDAMERIKA

PORTLAND, ME. La "Portland Express," grava tagjurnalo en ĉi tiu urbo presis tre interesan artikolon pri la kunveno de la Portlanda Societo. Tre ĝojan kaj sukcesan vesperon oni ĝuis, kun kantoj, paroladoj, rakontoj, kaj muzikoj. La Portlanda Societo enhavas pli multe ol 60 anoj kun SEL "Progresa Rondo" enhavantan 20 gejunuloj. Kredeble la urbo estas unu el la plej fortaj esperantistaj lokoj en Novanglujo.

MANCHESTER, N. H. Ĉiam alvenas el ĉi tiu urbo novaĵo pri la daŭrigata agemeco de la Pionira Grupo. La monata kunveno por januaro okazis kun plej granda ĉeestantaro ol iam antaŭe dum la sezono. Interesa programo konsistante el rakontoj, muzikoj, kaj ludoj estis prezentataj, kaj ĉiuj deklaris ke la "amuzada vespero" estas tute sukcesa por ŝanĝi la unuformecon de la klaslaboro.

BOSTON, MASS. Ĉe antaŭ ne longa kunveno de la Bostona Esperanta Societo okazis tre interesa afero. Samvespere vizitis la klubejon du fremdaj samideanoj,—S-ro Garcia el Katalunjo, kaj S-ro Flikop el Rusujo. Nek la Rusano, la Katalunjano, nek la Bostonanoj povis paroli ian komunan lingvon krom Esperanto, sed kompreneble tio nur aldonis intereson al la vigla dum la kunveno kaj poste okazinta interbabilado.

PITTSBURGH, PENNA. Januaron 9an, okazis laŭregula ĉiunmonata kunveno de la Esperanta Fakto de la Akademio de Scienco & Arto. La prezidanto, Sro. Clifford, malfermis la kunsidon per mallonga parolado. La sekretario, Sro. Smith, legis la protokolon de la antaŭa kunveno kaj Sro. Hailman, estro de la administra komitato prezentis detalan raporton pri la agado de la Fakto. Li tiam anoncis la nomojn de la personoj kiuj estis elektitaj por servi je la du gravaj komitatoj de la Fakto. Sro. A. E. McKee estas estro de la komitato por enkondukigi Esperanton en la publikajn lernejojn kaj Sro. R. V. Eder estas estro de la propaganda komitato. S-ino Stoner parolis pri sia kurso kaj ĝia progreso. Ŝi diris ke ŝi estas tre kontenta pri ĝi kaj ankaŭ parolis pri sia kurso en la Universitato de Pittsburgh. Fraŭlino Anacker deklamas tre amuzan rakonton kiun ĉiu akklamis tre kore. Post mallonga skizo de Esperanta Kroniko tra la mondo de Sro. Hailman, la kunveno fermiĝis.

La Esperanta fakto de la Akademio nun havas 95 membrojn.

PICKFORD, MICH. La "Clarion," tre lerta ĉiusemajna ĵurnalo, ankoraŭ daŭrigas publikigi artikolojn kaj leterojn rilate al la kara afero, en ĉiu eldono. La elĉerpajoj estas tre interesaj kaj multe da reklamado Esperanto gajnas.

WICHITA, KANS. La Esperantistoj de ĉi tiu urbo nun organizis kaj antaŭ ne longe okazis kunveno en la altlernejo. La Estraro de Edukado donis la uzadon de klasĉambro por la laboro.

La "Democrat" daŭrigas publikigi ĉiusemajne interesajn elĉerpajojn en kaj pri Esperanto.

CINCINNATI, OHIO. Kiel rezulton de la agema propagando de kelkaj samideanoj ĉi tie, la "Cincinnati Esperanto Society" gajnis anojn kaj estas organizita kiel filion de EANA. Oni elektis novajn oficistojn kaj intencas fari sian societon bonkonata en la urbo.

NO HOBBY LIKE STAMP COLLECTING!

AND ITS PRIME MINISTER IS

Mekeel's Weekly Stamp News

19 Casp Bldg., Boston, Mass.

ALL THE NEWS ABOUT STAMPS!


THOUSANDS OF STAMP BARGAINS!

ARTICLES ON STAMPS BY SPECIALISTS!

Six Months for 25c and Your Choice of These Premiums:

- No. 1. 205 all different foreign postage stamps.
- No. 2. 101 different United States stamps.
- No. 3. Book illustrating and describing U. S. stamps.
- No. 4. Book "How to Make Money in Postage Stamps."
- No. 5. Album that will hold 600 stamps.

Subscription Price to Canada and Abroad, 50c for 6 Months.



PRINTING?

WE DO IT

UP-TO-THE-MINUTE EQUIPMENT

PROMPT SERVICE

CAREFUL WORKMANSHIP

LINOTYPE COMPOSITION
A SPECIALTY

ARE YOU "FROM MISSOURI"?

LET US SHOW YOU



The American Esperantist Co., Inc.

West Newton, Mass.

At Last, A Real Footease

Simpson "Higena" Sanitary Innersole easily placed inside your shoes. Immediately relieves tired, aching feet and chilblains. Positively cures callous and keeps your feet warm during the Winter. Trial pair will convince you. Send size of shoe.

Price 25c.

Mailed 30c.

Maker, ALBERT E. SIMPSON,
39 Webster St., Lynn, Mass.

"I saw your ad in

AMERIKA ESPERANTISTO"

THE WHOLE OF ESPERANTO

EXCELLENT PROPAGANDA MATERIAL ORDER TODAY

5c per copy

10 for 25c

50 for \$1.00

Contains Grammar, Vocabularies and a Little Story. Just the thing to interest your non-Esperantist friends.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.,

West Newton, Mass.



MULTAFERA VIRO DIRAS:

“Mi kontentigis min lastan dimanĉon—vi bone scias kiel la pluvo falis—nu, mi restis la tutan tagon ĉe mia ‘Emerson’ aŭtomate ludata fortepiano.” S-ro Ordinarulo—la viro de komercaj prizorgoj kaj neinstruitaj manoj, je piano-ludado—sidiĝas ĉe sia muzikilo kaj donas indan ĝuegon al muzikema amiko, montrante **bonan ludmanieron, artistan metodon, kaj esprimadon** per sia farado. Eble ĝi estas grandopero, aŭ irio de unu el la famkonataj majstroj, aŭ kantsukceso el la plej nova komedia prezentado.

La “Emerson” aŭtomate ludata fortepiano tute tradukas lian humoron,—metante en muzikon liajn proprajn revojn—transportante lin, kvazaŭe, en novajn landojn kaj inter strangaj popoloj.

Ordinara ŝato por la muziko ebligas ĉion ĉi per la “Emerson” ilo—la orelo por aŭdi kaj la mano por ludi vere enperdiĝas en unuecon je la plej natura maniero. Per la “Emerson” ludilo vi atingos la simpatian kaj melodiscienca kvalitojn kiujn oni amas en muzikado.

Petu katalogon esperante.

Vendistoj en ĉefaj urboj kaj urbetoj.

EMERSON PIANO CO.

- -

Boston, Mass.